

La svisa federacia konstitucio de 1848
Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI 1991-03-14 kaj 16

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée GACOND nome de Svisa Radio Internacia.

A.- Dum ses elsendoj ni priskribis la interkantonajn konfliktojn, kiuj karakterizis la svisan vivon en la antaŭfederacia tempo. Pro manko de superkantonaj institucioj la svisa Dieto ne kapablis arbitracii la interkantonajn konfliktojn, kiuj kulminis en la sonderbunda milito de 1847.

Cl.- «Sonderbund» en la germana lingvo signifas «aparta ligo». En aparta ligo grupiĝis ok konservativaj katolikaj kantoj en defenda pakto kontraŭ la radikalistaj ŝtatoj, kiuj akiris pli kaj pli da voĉoj en la svisa Dieto, ĉar regule kreskis la nombro de la kantoj kun radikalista registaro. Ekde la jaro 1847 tiu partio ankaŭ ekhavis plimulton en la Dieto mem, kaj pro tio tiu asembleo fine ĉesis esti senpova. Ĝi proklamis la apartan ligon kontraŭa al la Svisa Pakto de 1815 kaj varbis federacian armeon por perforte obeigi la sonderbundajn kantojn, kiuj ne eksiĝus el tiu aparta ligo. La ĝeneva kolonelo Henri Dufour estis elektita generalo de tiu armeo. Li gvidis sian kampanjon laŭ paciga spirito anoncanta la principojn de Ruĝa Kruco fondota 16 jarojn pli poste.

A.- La kanto Frejburgo kapitulaciis la unua, dek tagojn post la komenco de la kontraŭ-sonderbunda kampanjo. Sekvis post sep tagoj la eksiĝo de la registaro de Zug kaj tri tagojn poste de Lucerno. Fine de novembro 1847 la kampanjo konkludiĝis kun la venko de la federacia armeo. La konflikto daŭris apenaŭ unu monaton, kaŭzinte entute el ambaŭ kampoj 104 mortintojn kaj 374 vundintojn.

Cl.- Tuj sekvis politikaj decidoj : La Dieto pagigis la militajn kostojn al la sonderbundaj kantoj kaj monpunon ricevis la ŝtatoj Neuchâtel kaj Appenzell internaj Rhodoj, kiuj estis rifuzintaj disponigi trupojn al la federacia armeo. Demisiis la aŭtoritatoj de la kapitulaciintaj kantoj kaj anstataŭis ilin novaj registaroj pli kunlaboremaj.

A.- Dum la sonderbunda konflikto la grandaj eŭropaj ŝtatoj provis interveni por la propra gajno kaj post tiu milito ili refoje prezentiĝis por malhelpi al la svisoj memsolvi siajn problemojn. En januaro 1848 la ambasadoroj de Francio, Aŭstrio kaj Pruslando transdonis samtekstajn atentigojn, kiuj celis trudi la principon, ke revizio de la Federacia Pakto de 1815 kaj akcepto de nova konstitucio nur povas okazi per unuanima decido de ĉiuj kantoj.

Cl.- Tiu ekstera interveno en la svisajn aferojn vekis la indignon de la membroj de la svisa Dieto kaj konsciigis ilin, ke nepre alvenis la tempo solvi la proprajn problemojn, por eviti enmiksiĝon de najbaraj ŝtatoj emaj je teritoriaj konkeroj. Tial tuj kreiĝis kvar dietaj komisionoj, kiuj devis pretigi projekton de nova federacia konstitucio. Iliaj kunvenoj estis nepublikaj, kio favoris la malfermon de larĝa debato, en kiu ĉiuj vidpunktoj povis libere esprimiĝi sen timo je reeĥo en la publiko.

A.- La kreo de komuna merkato kun rezigno je doganoj inter la kantoj, kun rajto al ĉiuj svisaj civitanoj libere instaliĝi, komerci kaj voĉdoni en ĉiuj kantoj, okazigis pli da kontraŭstaroj, ol oni antaŭvidis.

Cl.- Por kompreni la malfacilaĵojn tiam renkontitajn, oni devas konscii, ke Svislando estas fragila ekvilibro inter neakordigeblaĵoj. Ekzistas unueco nek ŝtata, nek lingva, nek religia, nek kultura, nek tradicia, nek politika. La sola unuiga principo estas la senkompromisa defendo de la kantonaj liberecoj kontraŭ la regemo de la grandaj eŭropaj ŝtatoj.

A.- Ni listigu la dividojn, kiuj karakterizis la tiaman Svislandon kaj kiuj ofte plue aktualas :

Cl.- La kamparanoj rifuzadis esti regataj de la urbanoj. Ili celis la civitanan egalecon kun la urbanoj, kaj la iom-post-ioma akiro de tiu egaleco fakte malfavoris la kreskon de la urboj. Fariĝis same avantaĝe loĝi ekster la urboj, ol en la urboj. Tial Svislando ne havas grandajn urbojn.

A.- Religie estas divido inter la katolikoj kaj la protestantoj, kiuj estas proksimume samnombraj. Ekzistas ŝtatoj katolikaj aŭ protestantaj kaj ŝtatoj kun religie miksita loĝantaro.

Cl.- La lingva bunteco estas vera karakterizaĵo de Svislando. La lingvaj minoritatoj ĉiam estis tre tiklaj por la defendo de sia aŭtonomeco. Tial la franclingvanoj, la tiĉinanoj kaj la romanĉoj estis adeptoj de federaciismo, kiu respektu la lingvajn regionismojn. Ili volis fortajn kantonojn kaj malfortan federacian registaron. En la germanlingva parto la kantonismo favoras la praktikadon de malsimilaj alemanaj dialektoj. Por simboli la eviton de ĉia lingva hierarkio aŭ diskriminacio, la Svisa Federacio ricevis la neŭtralan nomon latinlingvan « Confoederatio helvetica » , memore al la helvetoj, kelta popolo, kiu regis en la lando antaŭ la romia konkero.

A.- La politikajn debatojn karakterizis bataloj inter la revoluciemuloj kaj la tradiciemuloj, inter la radikalistoj kaj la konservativemuloj, inter la federaciemuloj kaj la centralistoj, inter la adeptoj de ekonomia liberalismo kaj de plipotencigo de la federacia povo.

Cl.- Ankaŭ ekzistis neakordiĝemo inter la kosmopolitismo kaj gastigemo de kelkaj kantonoj kaj la rezistemo de aliaj al ĉiaj eksteraj influoj.

A.- Kaj super ĉio ekzistis malfido de la etaj kantonoj kontraŭ la grandaj, kies potenco estis iel timiga.

Cl.- La redaktantoj de la federacia konstitucio de 1848 havis la saĝon serĉi juran sistemon, kiu kongruas kun tiu svisa bunteco, konsiderante ĝin kiel riĉaĵon. La Dieto devis decidi el inter sep eblecoj, kiujn proponis la kvar komisionoj. Ĝi voĉdonis favore al mezvoja kompromisa solvo: nek respublika centralismo, nek daŭrigo de la konfederacia senpoveco : respekto de la kantonaj teritorioj, sed en la Konsilantaro de la Ŝtatoj limigo de la registaraj delegitoj al po du por kantonon konfirmas la principon de egaleco de la kantonoj senkonsidere al ilia grandeco. Kreiĝis dua parlamenta ĉambro nomata Nacia Konsilantaro, kie la deputitoj elektiĝas laŭ la normo de po unu parlamentano por dudekmil loĝantoj. En ĝi la kantonoj estas do reprezentataj laŭ la graveco de sia loĝantaro.

A.- Laŭ la prijuraj konsideroj de la franca filozofo Montesquieu, ekzistas strikta distingo inter la tri povoj decida, plenuma kaj juĝa. Posedas la decidan povon la du ĉambroj, kiujn ni menciis. Ilia kuniĝo formas la Federacian Asembleon, kiu kunvenas por elekti la membrojn de la federaciaj registaro kaj tribunalo.

Cl.- La plenuman povon konsistigas Federacia Konsilantaro. Unu el la modeloj de la konstitucio de la Svisa Konfederacio estis tiu de Usono, sed la svisoj ne volis havi potencon prezidanton, kiel estas en Usono. La kvin membroj de la Federacia Konsilantaro devas labori laŭ kolegara sinteno. Nur unu jaron daŭras la prezidode unu el ili super la kvar aliaj.

A.- Tiu limigo de la povo de la prezidanto de la Federacia Konsilantaro celis la protektadon de la povo de la aŭtoritatoj de la kantonaj registaroj, kiuj tute ne estis unuecigitaj. La federacio grupigis 25 sendependajn ŝtatojn, kiuj por la unua fojo akceptis perdi parteton de sia suvereneco profite al komuna superŝtata aŭtoritato.

Cl.- Se la Dieto estus obeinta al la atentigo de la ambasadoroj de Aŭstrio, Francio kaj Pruslando, la metamorfozo de Svislando de konfederacia ligo de ŝtatoj al federacia ŝtataro ne estus okazinta. Dum la diskutoj de la proponoj neniu decido renkontis unuanimecon kaj en konkluda voĉdono la Federacia Konstitucio estis akceptita nur de dektri kantoj kaj duono. Inter la kontraŭuloj oni trovis ne nur la konservativajn delegitojn de la kantono Schwytz, sed ankaŭ la tro revoluciemaj ambasadoroj de la potenca ŝtato Berno.

A.- La 12-an de septembro 1848 la Dieto, en lasta kunsido, proklamis la rezulton de la konsultado de la popoloj de la 22 kantoj per tiuj nombroj : « La konstitucio estas akceptita de dek-kvin kantoj kaj duono kaj rifuzita de ses kantoj kaj duono. »

Cl.- Ĝenerala emocio disvastiĝis tra la tuta ŝtataro. Eĉ la kontraŭuloj ekkonsciis, ke inaŭguriĝis nova periodo en la svisa historio. La kantoj, kiuj kontraŭstaris ĉiujn decidojn EN LA Dieto, decidis submetiĝi demokrate al la deziro de la plimulto. La kantono Schwytz esprimis tion per deklaro de aliĝo al la federacio sen iu ajn rezervo. La eŭropaj ŝtatoj nur povis agnoski, ke la Svisa Federacio estis akirinta originalan memstarecon.

A.- Senpova konfederacio metamorfoziĝis al bone organizita federacio, kies ŝtatoj konservis siajn apartaĵojn, eĉ se parton de sia suvereneco ili cedis al la superŝtataj aŭtoritatoj.

Cl.- Similan metamorfozon eble foje konos la nacioj de Eŭropo aŭ eĉ de la mondo, konstruante Eŭropan Federacion kaj Mondan Federacion. Sed ni havu paciencon !

A.- Vi aŭdis elsendon de Svisa Radio Internacia. Claude kaj Andrée GACOND pretas sendi la tekston de sia prelegaro pri la formiĝo de la Svisa Federacio al la geaŭdantoj, kiuj petos ĝin skribi. Ĝis reaŭdo !